# *Vicprezidento de Kubo plenumas ampleksan tagordon dum sia vizito al Tanzanio*

*Image not found or type unknown*



**Foto: @PresidenciaCuba**

Havano, jan 24 (RHK) La membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj vicprezidento de la Respubliko, Salvador Valdés Mesa, renkonti?is ?i-merkredon kun sia tanzania ekvivalento, Philip Isdor Mpango, kiel parto de lia oficiala vizito al tiu afrika lando.

En sia X-profilo, la Prezidanteco de Kubo raportis, ke la altranga gvidanto parolis pri la historiaj rilatoj de amba? landoj kiuj havas siajn radikojn en la amikeco konstruita inter la gvidantoj Fidel Castro Ruz (1926-2016) kaj Julius Nyerere (1922-1999).

Same, li dankis Tanzanion pro ?ia subteno en la batalo de Kubo kontra? la usona ekonomia, komerca kaj financa blokado, kaj ?ia subteno por ?ia ekskludo de la listo de ?tatoj supozeble sponsorantaj terorismon.

Valdés Mesa certigis al Philip Isdor Mpango, ke lia lando ?iam povos kalkuli je nia solidareco.

La vicprezidento anka? renkonti?is kun Tulia Ackson, prezidanto de la Parlamento de Tanzanio, al kiu li esprimis sian konfidon, ke ?i tiu vizito "faras gravan kontribuon por plifortigi la ligojn inter amba? landoj kaj Parlamentoj".

La gastiganto aprezis la eblecon de la renkonti?o, kiu konsistigas ?ancon por "paroli pri malsamaj aferoj la? kunlaboro."

?i-merkredon, la kuba vicprezidanto komencis sian labortagon en tanzania teritorio apud sanaj kunlaborantoj el la plej granda insulo en Antiloj.

Valdés Mesa dankis ilin pro "la eksterordinara laboro, kiu estis farita ?i tie rilate kunlaboron ekde la 1960-aj jaroj", kaj emfazis ilian kontribuon "kiu estas ne nur grava, sed anka? esenca por la tanzania popolo kaj por Kubo", li certigis.

Fonto: @PresidenciaCuba

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/345264-vicprezidento-de-kubo-plenumas-ampleksan-tagordon-dum-sia-vizito-al-tanzanio

Radio Habana Cuba